

TEA-BULTENO

9^A JARO

JANUARO - FEBRUARO 2006

NUMEROJ 1-2



Estimataj TEA-anoj, kiam vi legos tiujn ĉi vortojn, ni troviĝos jam plene en la nova jaro, en la **Jaro de la Centjariĝo de TEA**.

Ĉu tio ion diras al vi? Espereble jes... Imagu: ni fariĝis centjaraj, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, malgraŭ niaj konstantaj problemoj kun mon-rimedoj, maljuniĝo de nia membraro, ŝanĝo de sidejoj, ktp.

Estas evidente, ke oni bezonus novajn fortojn, junajn kaj viglajn, por plilarĝigi nian agadon, por instrui esperanton pli moderne kaj disvastigi ĝiajn idealojn, sed precipe por iomete esperi atingon de plua simila evento.

Sed kion fari? Ni ne rikoltis ĝis nun grandan sukceson ĉirilate, kvankam estontece dank' al via helpo, jes, helpo de vi, Leganto, la afero povus ŝanĝiĝi.

Por la centjariĝo de TEA pluraj projektoj jam havas konturojn kaj laboro startis por realigo: ĉu vi pretas kunlabori? Ĉia helpo estas bonvena, la rimedoj je nia dispono ne abundas.

2006 tamen estas ankaŭ la jaro de Universala Kongreso en nia lando. Post la unuaj du, en Romo - 1935 - kaj en Bolonjo - 1955, jen Florenco, unu el la plej interesaj, belaj urboj en la tuta mondo.

La Ministerio pri Kulturo, hon. Francesco Cossiga, lingvistoj Tullio De Mauro kaj Francesco Sabatini, la Rektoro de la florenca Universitato prof. Augusto Marinelli, la aktoro Moni Ovadia, troviĝas jam en la listo de la Honora Komitato.

La temo "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo" tuŝos multajn argumentojn pri uzado de lingvoj en lernejo kaj en internacia komunikado, kaj povos pliriĉigi niajn konojn kaj permesi pli proksiman kontakton kun tiuj vidpunktoj kaj sintenoj. Krome ĝi estas proksime ligita al la kampanjoj de UNESKO, kio donos eblon atentigi ĝin, ties italan komisionon kaj la florencajn UNESKO-klubojn pri la kongreso mem.

Inter UK en Romo kaj Bolonjo pasis 20 jaroj, inter Bolonjo kaj Florenco la jaroj estos 51, supozeble ne baldaŭ okazos la 4^a UK en Italio. Plejverŝajne por multaj inter ni, tiu ĉi estos la sola ŝanco partopreni tian grandiozan aranĝon, proksimaloke, sojle de nia hejmo.

Mi instigas vin partopreni, estas atendataj por ĉi UK pli-malpli 3 000 personoj el la tuta mondo: ĉu vi, ĝuste VI, malĉeestos?

Fine, ĉi-monate, la tradicia jara asembleo okupos nian tutan atenton. Nova estraro estos elektita, agad-planoj diskutotaj, kelkaj gastoj ĉeestos kaj gaja kunestado ĝojigos la tutan aferon. Mi varme petas vin: bonvolu ĉeesti, **NI BEZONAS VIN, VIAJN SUGESTOJN, VIAN SUBTENON**. Ĝis tiam, ricevu korajn salutojn *Edvige*



Rendevuoj ĉe Radio

Kiel en 2005, ankaŭ ĉijare eblos aŭskulti, enkadre de la aliprogramoj de Regiona Radio - RAI UNO, informojn diverstemajn pri Esperanto, en du lingvoj: itala kaj slovena. La parolantoj, kiel jam tradicie, estos Edvige, Devana kaj Elio. Ĉi-sube datoj kaj horaroj de la disaŭdigoj. Bonan aŭskultadon!

Dato	Temo	Lingvo/horo
03/01	TEA festas sian 100-jariĝon	slovene/12.45
10/01	UK de Esperanto en Italio	slovene/12.45
17/01	Lerni Esperanton: kial?	slovene/12.45
01/02	TEA festas sian 100-jariĝon	itale/14.40
01/03	UK de Esperanto en Italio	itale/14.40

Sep Bibliotekoj ricevis THORSEN-Apogon

La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn al ok Esperanto-bibliotekoj el la rimedoj de la Biblioteka Apogo ROMA KAJ POUL THORSEN. UEA disdonas ĉiujare ekde 1997 subvenciojn el la monsumo, kiun la konata dana esperantista paro donacis por pliriĉigi la kolektojn de bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco.

En 2005 disponeblis 1000 eŭroj. Al Slovaka Esperanto-Biblioteko oni asignis librojn je la valoro de 80 eŭroj.

Triesta Esperanto-Asocio (Italio), Kultura Centro de Esperanto (Campinas, Brazilo) kaj Fonduso Cesar Vanbiervliet (Kortrijk, Belgio) ricevis po **100 eŭrojn**. Provinca Filio Havano de Kuba Esperanto-Asocio ricevis 195 eŭrojn kaj Esperanto-Societo CELE-KULA (Niš, Serbio) 200 eŭrojn. La plej grandan subvencion, 225 eŭroj, ricevis Hubei-a Esperanto-Asocio (Ĉinio).

Triesta Esperanto-Asocio ricevis la jenajn librojn:

- ★ La vivo de Henriko Kvina - *Trad. H. Tonkin*
- ★ Libro de la mirindaĵoj (La priskribo de la mondo) - Marko Polo - *Trad. S. Moirand*
- ★ Sed homoj kun homoj - *Ziko Marcus Sikosek*
- ★ Faktoj kaj fantazioj - *Marjorie Boulton*
- ★ La Zamenhof-Strato - *R. Dobrzinski*
- ★ Laŭdo de l'stulteco - *Trad. G. Berveling*
- ★ La tragedio de Reĝo Lear - *Trad. K. Kalocsay*
- ★ Baza esperanta-radikaro - *W. Pilger*

Elkore dankindas la mecenatoj kaj la asignantoj!

Januara Programo	
10 - mardo	20.00 - Malmuntado de ekspozicioj
13 - vendredo	20.00 - 100-jariĝo de TEA! - ni planu kune la tutjaran festan programon!
17 - mardo	20.00 - Esplorado por preparo de libro pri Historio de TEA
20 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
24 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
27 - vendredo	20.00 - <i>Nia kara Triesto, el foraj tempoj!</i> Pino prezentas malnovajn bildkartojn
28 - sabato	10.00 - JARA ASEMBLEO DE TEA
31 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
Fĉebruara Programo	
03 - vendredo	20.00 - Traduk-ekzerca vespero (It↔E-en)
07 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
10 - vendredo	20.00 - Trafoliumado de PIV
14 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
17 - vendredo	20.00 - Kart-ludado
21 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
23 - ĵaŭdo	20.00 - SIA - Karnavale festi ĉe TEA
24 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
28 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
Ĉiumarde, ekde la 18^a h, progresiga kurso Ĉiuvendrede, ekde la 18^ah, baza kurso de Esperanto	

38^a Semajno de Internacia Amikeco 19-26 februaro 2006 en Triesto



“Ni ekbruligas la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni ŝatas labori por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj”.

Tiel Erik Carlson antaŭ 38 jaroj anoncis la belan ideon pri la starigo de tiu evento kiu poste fariĝis tutmonda tradicio de la Esperanto-medio. Ĝi estis kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de la Internacia Lingvo kaj ĝi aparte taŭgas por aranĝi komunan eventon kun unuopuloj kaj membroj de societoj aŭ kluboj.

Ankaŭ ĉijare TEA organizos ion kadre de SIA: kiel eble plej frue ni informos vin, aŭ, des pli bone, vi de tempo al tempo petu informojn pri ĝi. Intertempe, memkompreneble, bonvenaj estas viaj sugestoj, proponoj, ks.

Interesaj www.adresoj

Ĉe <http://www.lernado.it/> eblas konsulti la vortaron de Carlo Minnaja, dum por konatiĝi kun diversaj kuirartoj: http://eo.wikibooks.org/wiki/Kuirlibro:Kuirado_en_esperantlingva_interreto

Triesto kaŝita

Malkovru nekongatajn erojn de nia urbo!

MALNOVA INSIGNO

De tempo al tempo, vagante tra la urbo, indas ĉielenlevi la okulojn. Sur la fasado de palaco, kie estas Civitana Biblioteko kaj Muzeo de Natura Historio, ankoraŭ nun estas bone legebla, antikviĝinta toponimia indikilo: “PLACO LIPSIA”. Tiel fakte nomiĝis antaŭtempe la nuna “PLACO HORTIS”.

LA FLUGMAŜINO RUPNICK

Ĉiu angulo de via urbo povus rakonti al vi sian ĉu interesan, ĉu gajan, ĉu malfeliĉan, ĉu timigan ... historion! Tiel okazas ankaŭ en Triesto: ekzemple, la mallarĝa strato Sankta *Sergio* havas sian rakontindan historion. Fakte, dum mallonga periodo tie starigis eĉ ... fabriko de flugmaŝinoj! Dum la someraj monatoj de la fora 1908, amanto de aeronautiko, la mekanikisto Jozefo Rupnick, elpensis konstrui flugmaŝinon en la mezo de la strato, antaŭ propra hejmo. Sian verkon li finis ene de du monatoj, tutblokante la strato-trafikon. Finfine, paradiso tie belega flugmaŝina prototipo, okupanta la tutan stratvastecon. Ankoraŭ ekzistas fotoj, kiuj atestas tiun “hejmecon” ekstravagancan konstruaĵon, en epoko kiam flugmaŝinoj vere estis ĉe la komenca stadio. Pretere dirite, dum certa tempo la flugmaŝino restis ĉe magazeno en strato *G. Vasari*, sed neniu scias kiamaniere ĝi atingis tiun lokon! Alvenis la tago de la alstrebata elprovo, kaj tiam la rezulto estis bedaŭrinde katastrofa. Bonŝance neniu suferis damaĝon, escepte la ... monujo de l' kompaniinda mekanikisto.

Ĝestulo

Nuna aktivado de Esperanto-movado en Mongolio

Depost la unua mongola Esperanto-Kongreso, okazinta aŭguste 2001, kelkaj mongolaj Esperantistoj ĉiujare kunvenas, por hisi, antaŭ ekstermovada publiko, Esperantan flagon. Ĝi ja trifoje en la jaro flirtas, ene de antaŭfiksita tempodaŭro, en la Mongolia ĉielo, de la plej alta supro de Hotelo BRIDGE PLAZA HOTEL. Lokaj aktivuloj zorgas pri ties hisado kaj malhisado.

La unua periodo estas okaze de la nacia festo-tago, ekde la 11^a ĝis la 13^a tago de julio: tiam la flago flirtas laŭ la ventoblovo dum tutaj tri tagoj! Interese estas, ke la Mongola Esperanto-movado havas 84-jaran historion, samkiel la festo-tago de nacia revolucio.

La dua flag-leva tago okazas la 21^{an} de decembro omage al naskiĝtago de la mondkonata scienculo, doktoro, profesoro B. Rinchen (1905-1977). Li ne nur estis Esperantisto, sed eĉ verkinto de la unua Esperanta lernolibro por mongoloj, kiu antaŭ nelonge atingis sian trian eldonon. B. Rinchen estis poligloto, lingvisto, etnologo, historiisto, publicisto, tradukisto kaj akademiano de la Scienca Akademio de Mongolio. Alta monumento, lin reprezentanta, staras majeste fronte de la ĉefurba biblioteko: la dignoplena statuo altas 3,5 metrojn kaj estis konstruita ene de unu jaro.

La tria flag-ceremonio okazas ĝuste, kiam komenciĝas la Universala Kongreso de Esperanto: tio por esprimi la solidarecon de mongolaj Esperantistoj al la tutmondaj samideanoj. Do, la Verda Standardo flirtas tutan semajnon en Ulaanbaatar, la ĉefurbo de Mongolio, samtempe kun la ĉiujare okazanta Universala Kongreso.

Raportis: *Batzaya Tsetseg-Ulziin batzaya@magicnet.mn*

Mallonge pri... UEA-moderniĝo!

La Centra Oficejo de UEA komencis liveri al la novaj membroj de la Asocio novstilan membrokarton. Temas pri kreditkartformata, plastumita kaj kolora karto, kies dezajno estas inspirita de la interreta hejmpaĝo de UEA. La unuan ekzempleron de la karto ĝenerala direktoro Osmo Buller transdonis al prezidanto Renato Corsetti dum sia laborvizito al Florenco la 18^{an} de novembro. Krom la novaj membroj de UEA, la novstilan karton ricevos inter la unuaj ankaŭ la komitatanoj de UEA kaj TEJO kaj la membroj de SOCIETO ZAMENHOF.

Tajĝiĉuan kaj Esperanto Novfondita ĉina organizo UTGE klopodas disvastigi la lukto-sporton tajĝiĉuan per la helpo de Esperanto. UTGE aranĝas siajn lecionojn por kontentigi diversajn bezonojn, por resti en sano, por helpi kuracadon kontraŭ kronikaj malsanoj, por partopreni en tajĝiĉuan-konkursoj, kaj por pli bone kompreni la ĉinan kulturon. Interesiĝantoj povas aliĝi al UTGE senkotize, kaj krome ĉiu, kiu havas sian lokan grupon kun minimume 4 aktivaj membroj (ekzercantoj de tajĝiĉuan), povas peti delegitecon de UTGE. Retejo de la nova faka organizo: www.01248.cn/espero/ Retaj lecionoj: www.01248.cn/espero/leciono/

BIO LIB — BIOLOGIA LIBRARO En la retejo <http://www.biolib.cz/en> troviĝas 10 mil sciencaj latinaj esprimoj pri fungoj, plantoj kaj animaloj, 4 mil el ili estas tradukitaj al Esperanto (laŭ PIV kaj aliaj fontoj). Verŝajne temas pri unu el la plej ampleksaj biologiaj nomenklaturaj Esperantlingvaj en la interreto. Oni povas plu redaktigi kaj kompletigadi ĝin, ne nur per Esperantaj, sed ankaŭ alilingvaj esprimoj (tridek lingvoj). La sistemo ebligas poste elekti vortarojn laŭ ĉiu ajn kombino inter la enkondukitaj lingvoj (Esperanta-hungara, hungara-franca, dana-angla, Esperanta-dana ktp.) kaj samtempe elekti fakon (tuton aŭ ekz. nur plantojn, nur mamulojn ks.). Por pli facila kompreno flanke de esperantistoj, ekzistas klariga paĝo <http://members.chello.cz/malovec/BioLib.htm> Estus bone, se esperantistoj helpus kompletigi la esperantlingvan nomenklaturon kaj ankaŭ esprimojn en sia gepatra lingvo, por ke la libraro povu rilatigi Esperanton al la ceteraj lingvoj.

Informis Miroslav Malovec malovec@volny.cz

La rido kaj vervo de Raymond Schwartz ... estas aktualigita kaj prezentas novaĵojn: plian leteron de la verkisto, foton de kabaretoj kaj reklamon de LA VERDA KATO (lia kabareto en la 20aj jaroj). Ĝi cetere havas novan adreson: <http://www.esperanto.cc/kabareto>. Nova materialo (fotoj, tekstoj, leteroj, rememoroj pri ŝvarcaj kabaretoj, sonregistraĵoj) estas daŭre bonvena.

Raportis: James Rezende Piton <james.piton@directnet.com.br>



OSIEK-PREMIO 2005

La 15^{an} de julio 2005, dum IEK en Rafina, Grekio, sekreta voĉdonado atribuis la premion, konsistantan el

600 €, al

Christian DECLERCK

pro **TAROKOJ KAJ EPOKOJ**

Informis: LA GAZETO, FR-55210 Creuë—Francio
<http://osiek.org>

Kelkaj novaĵoj pri la 91^a UK en Florenco

- ★ La temo: LINGVOJ, KULTUROJ KAJ EDUKADO AL DAŪRIGEBLA EVOLUO, volas emfazi ke la kultura diverseco estas riĉaĵo por la homaro; ĝi estas la fermentilo el kiu povas burĝoni novaj ideoj kaj novaj solvoj por la problemoj kiuj turmentas la homaron.
- ★ Honora Komitato: lingvistoj Tullio De Mauro kaj Francesco Sabatini, aktoro Moni Ovadia, senatano Francesco Cossiga, Rektoro Augusto Marinelli k.a.
- ★ Patroneco: ministerio pri kulturaj havaĵoj kaj agadoj
- ★ Oficiala oratoro: ĝeneva universitata docento François Grin, aŭtoro de raporto sendita al la franca Ministerio pri edukado, en kiu li evidentigis la egajn kostojn de la instruado de la angla en la francaj lernejoj (18.000 milionoj da eŭroj transiras el Francio al Britio pro elspezoj kunligitaj kun la studado de la angla, por studvojaĝoj kaj simile). Se Eŭropo enkondukus Esperanton en kombino kun fakta plurlingvismo oni povus ŝpari 25.000 milionojn da eŭroj.
- ★ Internacia Scienca Kolokvo dediĉita al Bruno Migliorini, elstara lingvisto kaj esperantisto. Ĝi okazos ĉe la Universitato de Florenco, kunlabore kun la Itala Akademio DELLA CRUSCA kaj de la Akademio de Esperanto.
- ★ Nombro de ĝisnunaj aliĝintoj: ĉirkaŭ 630.

Naŭdek ses procentoj de la virinoj pretas mensogi kiam la situacio malfaciliĝis

Londono – Laŭ la porina gazeto ‘*That’s Life*’ (Tia estas la vivo), absoluta plejmulto de virinoj en Britio – nome 96% – agnoskas, ke ili mensogas por eviti malfacilajn situaciojn. La gazeto eĉ publikigis la dek plej oftajn virinajn mensogojn. La enketo tuŝis pli-malpli kvin mil mezaĝajn virinojn el Skotlando kaj Kimrio.

La plej populara mensogo estas “*Ne, vi tute ne aspektas dika*”, kaj la dua premio iras al “*Tiuj ŝuoj kostis nur dek pundojn*”. La tria loko sur la podio estas “*La buso malfruis*”.

Sekvaj preferataj malveroj – se oni kredas la ĉirkaŭ kvin mil intervjuitajn damojn – estas “*Mi havas kapdoloron*”, “*Mi drinkis nur unumuran glason da ...*” kaj “*Tiu ĵupo tre bone sidas sur vi*”.

Fine de tiu listo de la plejoftaĵoj venas “*La ĉekon mi alpoŝtigis*”, “*Vi aspektas dek jarojn pli juna*”, “*Vi estas mirinda en la lito*” kaj fine “*Mi amas vin*”.

Laŭ la enketo, la virinoj mensogas precipe al la partneroj (70%), al la gepatroj kaj amikoj (64% kaj 65%), iom malpli ofte al la kolegoj kaj ĉefoj.

Bedaŭrinde ne estas menciataj la dek mensogoj plej ofte uzataj de la viroj, kaj ankaŭ ne malkovriĝas, ĉu la sinjoroj entute pli aŭ malpli mensogas ol la sinjorinoj.


Ĉerpita el *Monda Mozaiko* – www.edukado.net

Enketo kun premioj

pri la plej popularaj libroj en Esperantujo
Ĉiuj esperantistoj estas invitatataj partopreni la enketon, organizitan de la retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo. Per la enketo, oni celas kompili liston de la plej popularaj libroj en Esperantujo nuntempe. **KION FARI?** Krozi antaŭ la 31^a de marto 2006 al <http://www.retbutiko.net> kaj plenigi la enketilon pri viaj plej ŝatataj libroj. **PREMIOJ** La tri gajnintoj de la konkurso rajtas aĉeti en la retbutiko FEL eldonaĵojn por la valoro de respektive 100, 50 kaj 25 eŭroj!




Solvo de La kameloj de arabo



Demando: Kiom da kameloj ĉiu el ili ricevis?

Respondo: La embarasitaj filoj petis helpo de preterpasanto, rajdanta kamelon. Li haltis, malsupreniĝis, aldona sian kamelon al la 17 hereditaj kaj al la plej aĝa filo li donis la duonon, t.e. 9. La trionon, t.e. 6, li donis al la mezaĝa filo kaj la naŭonon, t.e. 2, li donis al la tria filo.



Entute la filoj ricevis $9 + 6 + 2 = 17$, kiom do la patro lasis al ili. Restis unu kamelo, sur kiu la preterpasanto denove supreniĝis por daŭrigi sian rajdado.

Simpla, ĉu ne? Jes, tion asertas kiu jam konas la respondon! Unumura solvo alvenis de Manolito, el Havano, kiu donis strikte matematikan klarigon: rondigante al la supera, entjera nombro la dividajon 17 per 2, sekve per 3 kaj 9, li atingis ekzaktan rezulton, kaj do, rajte gajnas la premion.

Sed mi dubas, ke la arabaj kamelistoj estus tiel matematike kleraj, eĉ se ĝuste danke al la araboj alvenis al ni, ja, la ... arabaj ciferoj! Aliflanke ili estas sendube ruzaj kaj mi preferas la solvon, kiel tradicie transrakontita. Ankaŭ per simpla ruzaĵo eblas superi malfacilaĵojn. Nu, preskaŭ ĉiam!

Kaj nun denove mi invitas vin ĉiujn, ŝviti super la ĉimonataj problemoj kun varmaj deziroj de sukceso. Du estas la solvendaj: "La sorĉa kvadrato" kaj "La renkontiĝo de instruistoj kaj gepatroj". Kiel kutime lotumita estos interesa premio!

KVIZO

SORĈA KVADRATO

Kiamaniere eblas vicigi la ciferojn de 1 al 6, unu kaj ununura fojo en ĉiu linio kaj ĉiu kolumno, tiel ke la sumo en ĉiu linio kaj ĉiu kolumno egalos al 21?

Elcerbumita de Viglo

por via cerbumigado!

Kiu kuraĝos ĝin solvi?

Mi atendas scivoleme la rezultojn! Bonan amuziĝon!

Bardyl Selimi proponas la jenan matematikaĵon

La renkontiĝo de instruistoj kaj gepatroj de ties gelernantoj

Dum la laŭvica renkontiĝo de instruistaro kaj gepatraro en iu lernejo, al la instruisto de la gepatra lingvo faris demandojn entute 16 gepatroj; al tiu de fremdlingvo 17 gepatroj, al tiu de ĥemio 18 ktp; fine, al la lasta instruisto (ni diru al tiu de matematiko) ĉiuj ĉeestantaj gepatroj. Entute, en la kunveno estis 31 personoj. Ĉu vi povas diveni kiom da instruistoj kaj kiom da gepatroj ĉeestis tiun renkontiĝon?

Solvo de ambaŭ vizioj aperos en la marta-aprila TEA-Bulteno kaj espereble ankaŭ la nomoj de la solvintoj!



DOLĈAJ KRUSTAĴOJ

Ĝus pasis la Kristnaskaj festoj, dum kiuj ni gustumis multspecajn dolĉajn specialaĵojn, inter kiuj certe ankaŭ ĉi tiujn, ĉe ni nomatajn KROSTOLI kaj en la venecia regiono KIAK'KERE, nome "babiladoj". Temas pri tiuj plataj dolĉaj krustaĵoj, blondkoloraj frititaj kaj surŝutataj per pulvorigita sukero: tre plaĉaj al palato! Tiuj ĉi dolĉaĵetoj aperas ĉefe dum la karnavalaj festenoj: tiam, junulece, - antaŭ tre tre longa tempo! - mi amuziĝis pudrante la vizaĝon de la amikinoj per elblovo de la kovranta sukero.

Provu vi mem, se vi deziras, prepari tiun ĉi specialaĵon laŭ recepto de fama triesta kukejo.

INGREDIENCOJ (por 1,200 kg)

- 830 g da faruno
- 330 g da laktokremo
- 130 g da sukero
- 70 g da butero
- 2 ovoflavoj
- 3 ovoj
- 5 g da salo
- 5 g da gistopulvoro
- 30 g da marsalvino
- 30 g da vinbera brando
- 30 g da konjaka brando
- 30 g da blanka vino
- raspita ŝelo de duon-oranĝo
- raspita ŝelo de duon-citrono
- vanilino (pinĉeto)
- oleo por friti
- pulvorigita sukero



PREPARADO

1. Kunknedu ĉiujn ingrediencojn.
2. Kiam la knedaĵo iĝas elasta, lasu ĝin ripozi, kovrita per tolaĵo, dum unu horo.
3. Per pastorulo platigu la knedaĵon ĝis folio, 2 mm-ojn dika.
4. Tranĉu la folion je diversgrandaj romboj, kaj poste ĉiun rombeton, unu- aŭ du-foje, en ties mezo.
5. Oni povas ankaŭ eltranĉi pastostriojn, kiujn poste oni nodas.
6. Fritu la faritaĵojn en oleo, prefere el diversaj semoj, plutenante ĝin je temperaturo de 180 °C.
7. Surŝutu la krustaĵojn per pulvorigita sukero.

Proverboj por la nova jaro

Farante oni lernas fari

Prokrastita ofte iĝas nefarita

Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it

Grupa ttt-ejo: [://it.groups.yahoo-com/group/](http://it.groups.yahoo-com/group/Associazioneesperantistatristina/)

Associazioneesperantistatristina/

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **sabaton la 28^{an} de januaro 2006 je la 10.00 en unua kunvoko kaj respektive je la 10.30 en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2005:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
 - ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
 - d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
 - e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta sabaton la 28^{an} de januaro 2006.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone! Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI-kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).